

la 4^{an} de Sept. 1928
31 B^d Mariette

Boulogne s/Mer
France

Kara Amiko mia

Respondante vian leteron de la 28^a de la pasinta, mi volas tut'kore danki vin pri ĝi. Ĝi estas rememoro de viaj kutimaj leteroj + en ĝi mi retrovas la Pŕelouč'an korespondinton. Mi bone vidas ke vi jam retrovis vian kutiman laboran vivon, la praktikan vivon por la pano.

Antverpeno, kongresoj, vojaĝoj k.t.p. estas for, aŭ enmetitajn¹ en la mensan kesteton de libertempo, de travivitaj, pasitaj impresoj.

Vi multe tro dankis min por la malmulto kion ni faris por ~~mi~~ vi. Vi ŝajnas impresigita ĉar vi sidis inter du unuakongresaninoj. Mi tamen esperas ke tio ne estis via plej forta impresio + ne estos via plej forta rememoro. Aŭ alie, mi pensos ke estis la ĉampanan vinon² + la Sauternes aŭ Graves, (mi ne bone rememoras la vinon blankan) kiu estis la kaŭzo de via impresio.

Kia damage³ ke ĉiuj devis disiĝi post tiu festeno! Estus estinta tre agrable de nove trinki ĉiuj kune kun moka-glaciaĵon, k.t.p. Precipe se oni estus sciinta ke en Bruselo vi ne retrovus nin. Tiu festeno vere estis sukcesplena.

Kaj la "Revuo" ĉu vi rememoros ĝin - kiel ĝi ripozigis kompare al Hamleto?

Mi esperas ke vi aĉetos radion (sed somere, pro atmosfero elektra ĝi neniam tiel bone funkcias kiel vintre) ke vi spertos multajn ĝuojn pro ĝi - ke vi povos gvidi ĝin en multajn direktojn kvankam ĝi ne estos direktilo - ke vi estos tre feliĉa pro ĝi, ke ĝi okupos viajn liberajn horojn kiam la menso bezonas aliajn impresojn ol advokatan laboron.

Mi ĵus vivis tenisan semajnon. Mi ne ludis, sed estis la ĉiujara internacia turniro + mi devis ĉeesti ĉiutage de la 9h ĝis la 20h. Tre agrable precipe kiam oni konas la grandajn ĉampionojn kiel mi. Nun ĉe la tre mondana Touquet-Paris-Plage komencos du aliajn tenisajn turnirojn. Ni ĉeestos je la fino de la semajnoj aŭtomobile. Touquet Paris Plage estas kun Deauville la plej mondana loko eble de Eŭropo. Ne tre granda, sed tre eleganta + multege kosta.

La vetero estas tre tre belega + varma. Al mi plaĉas multege tiuj belaj finsomeraj tagoj.

La konsilo aĉeti aŭtomobilon ŝajnis al vi iom proza. Sed tre fama poeto franca diris: "La vie n'est pas un roman, mais une histoire vraie dont on ne voit pas la fin"⁴ + kiel via vivo estas, pro via laboro, proza, la konsilo estus bona.

La kanton mi ofte ludas + tre bone povas aŭdi lin kantitan ĉe la Kongreso - tre bela ĝi estas + mi kredas ke mi estas ankoraŭ ĉe S^{ino} Faes.

Nun, esperante ke vi havas tiun-ĉi belegan veteron + ke vi povas fari belajn promenadojn (Mi estis apud la marbordo matene + pensis al vi en la maro - multaj sin banis hodiaŭ).

¹ ĉu "enmetitaj" ?

² ĉu "ĉampana vino" ?

³ ĉu "kia domaĝo" ?

⁴ en Eo: "La vivo ne estas romano, sed vera historio kies finon oni ne vidas."

Dankante vin por ĉio en la Kongreso. Kongreso kiu lasis al mi neforgeseblajn rememorojn, mi ~~vin~~salutas vin

Samidealane + amike

Alice Sergeant

Skribu kiam vi volas - leteroj estas ĝojo precipe kiam la skribanto estas skribema.